40
Birštonas, Litovio
BET

# Meandro 3

**Ĉiutaga informilo de BET- 40 en Birštonas**

*** Lundo *    2004.07.12**

**HODIAŬ**

## Lunde, la 12an de julio

**07:00-08:00** Jogo (por dezirantoj, en la sportista komunloĝejo)
**08:00-09:00** MATENMANĜO
**09:00-10:00** Konatiĝo kun litova lingvo (Petras Čeliauskas, en 204)
**09:00-12:45** Diplomiga seminario de ILEI (salono de urba magistrato)
**09:30-11:00** Paroligaj kaj perfektigaj kursoj (E. Bondar en 200, S.Trenner en 305, Nina Pietuchowska en 306)
**10:30-11:30** Kunveno de kuracistoj (A.Maruška, en salono de apuda domo ĉe administrejo)
**10:30-11:30** Prelego de S.Mandrak "Poŝtmarkoj rakontas historion" (en 204)
**11:45-12:45** Prelego de S.Mandrak "Esperanto-movado en Pollando" (en 204)
**11:00-12:00** BEF: Prelego de A.Korĵenkov "Unu ringo ilin regas" (en salono de magistrato)
**12:00-13:00** BEF: "La Ondo de Esperanto" kaj "Sezonoj" prezentas sin (en salono de magistrato)
**13:00-14:00** TAGMANĜO
**14:00-15:00** Prelego de S.Mandrak pri "Modernaj metodoj de E-instruado" (en 204)
**15:30-16:30** Prelego de A.Maruška "Pri Su-Ĝok metodiko" (en 204)
**17:00-18:00** Videofilmo Litova kalendaro (en 204)
**18:00-19:00** VESPERMANĜO
**19:00-20:00** Instruado de kantoj (V.Čojienė, en 204)
**20:00-21:00** KONCERTO de teatra infana studio "Nenuorama" (Petolulo) – en kulturcentro
**21:00-22:00** Distra vespero (en salono de apuda domo ĉe la administrejo)
**RIMARKO:** ĉar jam ĉiuj orientiĝas pri situo de ejoj, ni ne plu eksplikas detale, kie ili troviĝas.

## KONATIĜU KUN LITOVA LINGVO

Unu franca lingvisto iam diris: "Se vi volas ekaŭdi, kiel parolis niaj praprapatroj, veturu en Litovion kaj aŭskultu parolon de tieaj kamparanoj." Oni konsideras, ke litova lingvo estas la plej arkaika vivanta hindeŭropa lingvo. Se vi volas almenaŭ konatiĝi (ne ellerni) kun tiu lingvo, venu al prelegoj de P.Čeliauskas je la 9a horo (lunde, marde, ĵaŭde kaj vendrede) en salonon 204.

## ATENDANTE EŬRON

Jam 2,5 jarojn en 15 Eŭropaj ŝtatoj cirkulas eŭro-moneroj kaj eŭro-monbiletoj. La metalaj moneroj jam estas bone konataj kaj kolektataj de multaj homoj. Sed ne ĉiuj scias, ke ankaŭ eŭro-monbiletoj havas naciajn kontrolindikojn kaj signojn de diversaj monopresejoj. La naciaj kontrolindikoj estas litero antaŭ la monbileta numero, kaj tiu litero estas: L por Finnlando, M por Portugalio, N por Aŭstrio, P por Nederlando, R por Luksemburgio, S por Italio, T por Irlando, U por Francio, V por Hispanio, X por Germanio, Y por Grekio, Z por Belgio.

Dek novaj ŝtatoj, akceptitaj 2004.05.01, ankaŭ devis promesi enkonduki eŭrovaluton. Oni esperas, ke plej frue (jam en junio 2006) eŭron povas enkonduki Litovio, Estonio kaj Slovenio.

H.J.

# LA KVARDEKA BET INAŬGURITA



Hieraŭ, la 11an de julio je la 15a horo ĉiuj partoprenantoj kolektiĝis en urba kulturpalaco por inaŭguri sian kunvenon. En la enkonduka vorto la prezidanto de Litova Esperanto-Asocio Povilas Jegorovas koncize skizis historion de BEToj kaj salutis la kunvenintojn. Li informis, ke partoprenas ĉ. 250 esperantistoj el 20 landoj. Poste li transdonis la vorton al parlamentano esperantisto Stasys Kružinauskas, kiu tralegis salutmesaĝon de provizora Litovia ŝtatprezidento Artūras Paulauskas. La parlamentano parolis Esperante, li ĝojis povante partopreni en kunveno de samideanoj. S.Kružinauskas ofte partoprenas en aranĝoj de esperantistoj, mem organizas bicikladojn tra Litovio. En la inaŭguro partoprenis ankaŭ vicurbestro de Birštonas Juozas Aleksandravičius. Salutante la partoprenantojn li ĝojis, ke esperantistoj por sia aranĝo elektis la plej belan lokon de Litovio kaj bondeziris al ili interese kaj utile pasigi la tempon ĉi tie. Necesas aldoni, ke la magistrato de Birštonas finance helpis eldoni belan libreton pri la urbo, kiun ricevis ĉiuj partoprenantoj.

Je la nomo de partoprenantoj parolis B.Rozenfelde (Latvio). Ŝi rakontis kiel antaŭ 45 jaroj al ili venis ideo organizi la unuan renkontiĝon de studentoj esperantistoj kaj lanĉi la tradicion, kiu vivas ĝis nun. T. Hirsik (Estonio) donacis al la organizantoj antaŭ nelonge eldonitan grandan Esperantan-estonan vortaron. Je la nomo de finnoj salutis M.Sastamoinen. S.Mandrak (Pollando) proponis plifortigi kontaktojn inter ambaŭlandaj esperantistoj kaj same enmanigis donacon. Salutvortojn diris V.Batievski (Belorusio) kaj J.Halasz (Hungario), kiu eldiris deziron plioftigi reciprokajn kontaktojn.






La inaŭguro finiĝis per muzika koncerteto: Lidija Gomolickaitė-Grudzinskaitė profesie ludis fluton, plenumante klasikaĵojn de Lehar, Weber, Bach k.a.

Post la inaŭguro la partoprenantoj faris komunan foton antaŭ palaco de la urba kulturcentro.

# PRI LA EKSKURSO MERKREDE



Laŭ tradicio de BETοj (samkiel de UKoj), merkredo estas ekskursa tago. Ni proponas al vi tuttagan ekskurson per ŝipo de Birštonas al Muzeo de Popola Vivmaniero en Rumšiškės. Ni navigos 47 km laŭ meandroj de Nemunas, ĝuos ĉebordajn vidaĵojn kaj elŝipiĝos en Rumšiškės, proksime de Kaunas. Sekvos ekskurso tra la muzeo.

La Muzeo de Popola Vivmaniero estas aranĝita sur bordo de t.n. "Kaŭna Maro". Ĝi estas malfermita en 1974, okupas areon de 175 hektaroj kaj havas 180 nemoveblajn kaj 80 000 moveblajn eksponaĵojn. En tuta Litovio oni serĉis karakterajn malnovajn domojn kaj bienojn, malkonstruis ilin kaj rekonstruis ĉi tie en la muzeo. En la muzeo estas kvar sektoroj, kiuj reprezentas kvar etnajn regionojn de Litovio: Ĵemajtion, Aŭkŝtajtion, Dzukion kaj Suvalkion. En ĉiu sektoro estas po tri bienoj de malriĉa, mezriĉa kaj riĉa kamparanoj kun la kortoj kaj ĉiuj mastrumaj konstruaĵoj. La vizitantoj povas eniri en la domojn, konatiĝi kun ilia interno, kiu reprezentas vivon de litovoj en la fino de la 19a kaj komence de la 20a jarcentoj.

En kelkaj domoj estas aranĝitaj laŭtemaj ekspozicioj, kiuj montras, ekzemple, kiel oni festis nupton, paskon, karesman mar–don k. s. Longeco de ĉefa itinero estas ĉirkaŭ 5 km.

En ia distanco de ĉefa itinero en 1993 estis konstruita "jurto" – Siberia kabano, kiu memorigas pri suferoj de litovoj ekzilitaj al Siberio (necesas aldoni, ke dum la jaroj 1941-1953 ĉirkaŭ kvaronmiliono da litovoj estis deportitaj el Litovio. Soveta altrangulo M. Suslov iam eldiris: "Ne timu, Litovio restos, sed sen litovoj").

Estas rekonstruita ankaŭ placo de tipa litova urbeto, kie la ekskursantoj tagmanĝos kaj gustumos litovajn manĝaĵojn.

La ekskursa bileto kostas 45 lidojn (ĉ. 13 eŭrojn). La sumo enkluzivas vojaĝon, enirbileton en la muzeon kaj tagmanĝon. Ne prokrastigu aĉeton de bileto, ĉar en ŝipo estas nur 100 lokoj kaj ne ĉiuj partoprenantoj de BET povos ekskursi. La biletoj estas akireblaj ĉe registrejo aŭ en libroservo.

*LA ŜIPO FORNAVIGOS* post matenmanĝo je la 9a horo kaj revenos ĝis vespermanĝo je la 18a horo.

*NE FORGESU* kunpreni OMBRELOJN, ĉar la vetero estas ŝanĝiĝema.

# POR TIUJ, KIUJ NE ŜIPVETUROS

Kiuj ne partoprenos en la ekskurso kaj restos en Birštonas, ili povos promenadi en la urbeto, viziti lokajn muzeojn: la urban (str. Muziejaus 9) kaj tiun de sakrala arto (str. Birutės 10). Ambaŭ muzeoj estas malfermitaj de la 10a ĝis la 17a horo. En la muzeo de sakrala arto funkcias ekspozicio "Bildoj de Rafaelo en poŝtmarkoj" de juna esperantisto Marius Dyglys.

Kiuj dezirus bicikli tra Regiona Parko de Nemunaj Meandroj, trovu la straton Tylioji 1 (proksime de urba magistrato). Tie en direkcio de la parko oni povas lui biciklojn kaj ricevi necesajn informojn pri itineroj.

## ANEKDOTOJ PRI LITOVA KARAKTERO

Kvankam Litovio ne estas granda (sur teritorio de 65 000 kv. km loĝas 3,5 milionoj da homoj), en ĝi distingiĝas kvar etnaj regionoj kun kvar ĉefaj dialektoj. Karakteron de loĝantoj de tiuj regionoj iomete respegulas la subaj anekdotoj.

**– 1 –**

Diablo faris eksperimenton: li kaptis ĵemajton, aŭkŝtajton, dzukon kaj suvalkanon, ŝovis ilin en sakegon kaj forte pribatis per bastono. Poste li malnodis la sakegon kaj atendas, kio okazos.

La unua elsaltis aŭkŝtajto, bolanta de kolero, ne povanta eldiri eĉ vorton kaj forkuris rekte tra kamparo.

La dua elsakiĝis dzuko, same kolerega, sed anstataŭ forkuri li eksidis sur apuda ŝtono. "Kial do vi ne fuĝas?" – demandas la diablo. "Mi atendos miajn samsortanojn" – respondas tiu.

La tria elrampas suvalkano. Ankaŭ li ne forkuras, sed eksidas apude. Al demando de la diablo la suvalkano respondas: "Mi atendos ĝis kiam eliros tiu ĵemajto, kaj mi eble povos kunpreni la sakegon."

Sed la ĵemajto tute ne intencas elsakiĝi. "Kion vi tie atendas?" – malpaciencas la diablo.
Kaj la obstina ĵemajto malrapide respondas: "Kiu min enŝovis ĉi tien, tiu ankaŭ eltiru!"

**– 2 –**

Ĉiuj kvar reprezentantoj de kvar regionoj devis salti el aviadilo per paraŝutoj. La instruanto klarigis al ili: "Kiam vi elsaltos, kalkulu ĝis dek kaj poste tiretu ĉi tiun ŝnureton. La paraŝuto malfermiĝos kaj vi sekure surteriĝos." Ĉiuj elsaltis kaj faris kio estis dirita. Kaj jen ili descendas sub paraŝutaj kupoloj.

La aŭkŝtajto fiere ĉirkaŭrigardadas kaj pensas: "Ho, Dio mia, kiel bele aspektas la tero desupre. Ho, ke min nun ekvidu miaj samvilaĝanoj, kiel mi malsupreniĝas de la ĉielo!"

La dzuko, male, estas tre zorgoplena: "Dio mia, nur ke mi ne falu en ies legomĝardenon, ke mi ne faru damaĝon al homoj."

La suvalkano rigardas supren al la paraŝuto kaj miras: "Dio mia, kiom da silko, kiom da ĉemizoj mi povus kudri el ĝi."

Kaj la ĵemajto? Lia paraŝuto ne malfermiĝis kaj li falas malsupren kiel ŝtono. Feliĉe li trafis en grandegan amason da fojno: bumm!!! "Ses`!" – eldiris la ĵemajto...



**Kantado:** hieraŭ pli ol kvindeko da partoprenantoj sin distris per komuna kantado antaŭ la granda salono de Versme en la dua etaĝo. Ankaŭ vi estas bonvena hodiaŭ.

Ke nia informilo ***MEANDRO*** estu pli interesa, tio dependas ankaŭ de vi! Skribu viajn impresojn, proponojn, kritikojn, ankaŭ anoncojn pri viaj programeroj. Mallongajn artikoletojn transdonu al la redaktoroj aŭ restigu en registrejo. Pli longajn artikolojn pri la aranĝo skribu por ***LITOVA STELO***.

*Ĉu vi jam abonis la revuon?*
*Estas favora prezo por BET-anoj.*

LITOVA STELO


Redaktoroj: Petras ČELIAUSKAS, CHOE Taesok